

# La Espero

SVENSKA ESPERANTOTIDNINGEN

Nro 8/1981 ★ 5 kr



## Esperantoförbundet

**Adress:** EsperantoCentro,  
Brunnsgatan 21, 111 38 Stockholm ★  
**Telefon:** 08 - 11 74 34 ★


EsperantoCentro är öppet måndag  
— torsdag kl. 17 — 19 ★ **Postgiro:**  
20 12-3, Esperantoförbundet ★  
**Medlemsavgift:** direktansluten  
medlem 50 kr, ungdomsmedlem  
under 26 år 25 kr, familjemedlem  
(utan tidning) 15 kr ★  
Prenumerationsavgift för *La Espero*  
ingår i medlemsavgiften ★  
Medlemmar under 30 år får  
dessutom ungdomsförbundet SEJUs  
blad *ktp*.

## La Espero

Organ för Svenska  
Esperantoförbundet ★ **Adress:**  
EsperantoCentro, Brunnsgatan 21,  
11138 Stockholm ★ **Ansvarig  
utgivare:** Bertil Åkerberg ★  
**Redaktör:** Franko Luin,  
Mygdalsvägen 123, 135 42 Tyresö,  
telefon hem 08-712 82 91 ★  
**Prenumeration:** 50 kr per år,  
postgiro 20 12-3,  
Esperantoförbundet ★ Tidningen  
utkommer med åtta nummer per år  
★ **Fotosats och tryck:**  
EsperantoCentro, Stockholm 1982

## Esperantoförlaget

Postadress: Box 7502, 200 42 Malmö  
★ **Besöksadress:** Möllervångsgatan  
20 B ★ **Öppettider:** 1 sept — 15 maj:  
onsdagar kl. 10 — 11, torsdagar kl. 17  
— 18 ★ Skriftliga beställningar  
expedieras hela året, även under  
sommaren ★ **Telefon:** 040-12 20 29  
★ **Postgiro:** 578-5 ★ **Expedition:**  
Wivi Nilsson ★ **Styrelsens  
ordförande:** Anita Lindblom



# HODIAŬ

## "Internacia jaro de komunikado 1983"

Finfine "nia jaro" baldaŭ venos — "nia jaro" per kiu ni povos kompetente kunlabori kaj en kiu ni povos streĉi nian forton ĝis maksimumo.

La ĝenerala asembleo de la Unuiĝinta Naciaro en sia kunsido en novembro 1981 proklamis la jaron 1983 "Internacia jaro de komunikado".

Estis ĝis nun diversaj "jaroj" kaj "jardekoj" en kiuj la esperanto-movado kunlaboris. Kaj ni estas ankoraŭ meze de kelkaj "jardekoj" (kontraŭrasisma, virina, malarmada, evoluiga kaj eĉ trinkakva/higiena).

Kio estas komunikado? Kiam ni esperantistoj pensas pri tio, ni unue pensas pri nature homa, senpera komunikado. Kiam komunikaj fakuloj pensas pri komunikado, ili ĝenerale flankenŝovas la buŝ-al-buŝan komunikadon, ĝin tute neglektante aŭ rigardante kiel "klasikan" komunikmetodon.

Dum jardekoj UEA atentis la diskutadon de komunikadaj specialistoj. Sed ĝi vane serĉis vortojn "*lingva* problemo" en eldonaĵoj de tiukampaj fakuloj. Ili kutimas pritrakti telekomunikilojn, kiaj estas satelitoj, televidiloj, kaj aliajn amaskomunikilojn, kiaj estas gazetoj kaj aliaj eldonaĵoj.

Ne estas strange, ke en la UN-familio ĝuste Internacia Telekomunika Unio (ITU) forte deziris la proklamigon de komunika jaro. Supozeble ITU ne konsideras la buŝ-al-buŝan komunikadon.

Estas nur lastatempa fenomeno, ke Unesko komencis pritrakti lingvan dimension en la komunikado interhoma. Por tion atingi pluraj esperantistoj strebis, per verkado de leteroj, per vizitoj, per partoprenoj al konferencoj — el Usono, el Svislando, el Parizo. Kaj ne forgesende estas, ke ankaŭ la tempo maturiĝis, ĉar diversaj funkciuloj en la UN-medio (ankaŭ de Unesko) havas en si grundon por kompreni la argumentojn de la esperantistoj.

Povas facile pasi unu jaro, se ni ĉetable cerbumas, kiel ni agudum 1983. Sed ni bezonas tujajn, prudentajn agojn.

Jam ĉijare raportistoj de radio kaj televido kaj ĵurnalistoj en la mondo komencos serĉi ion por informi la publikon rilate al la komunika jaro 1983. Ili malfermos al ni la pordon. La gazetaraj servoj esperantistaj povas facile aliri ilin, se ili bone preparas sin kaj taŭge agas. La lokaj grupoj povas turni sin al siaj lokaj amaskomunikiloj.

Okaze de la komunika jaro ni atingu almenaŭ, ke la publiko konsciĝu pri la gravaj roloj de lingvoj en la komunikado, pri la ekzisto de lingvaj baroj en la internacia komunikado, pri la esenceco de lingvo en la ĉiutaga vivo, pri senpera interhoma komunikilo por internacia reciproka komprenado. Eĉ tutan libron pri tiuj temoj ni ja povas verki en propra nacia lingvo. Ni ĉiuj povas havi gravan taskon. La "Internacia jaro de komunikado 1983" iĝu por la esperanto-movado ia mejloŝtono.

"UN kaj ni"

## INNEHÅL/ENHAVO

- 130/Hodiaŭ: Internacia jaro de komunikado 1983  
131/Hit ska du komma i mitten av maj!  
132/SEJU  
132/Använd biblioteken och låna böcker  
133/Babels torn  
134/La ĝusta uzo de 'olimpiado'  
135/TEMO  
135/August Strindberg: Duona paperfolio  
136/Plebejo trovas la orsplenon  
139/Marjorie Boulton: Ne nur leteroj de plum-amikoj (8)  
141/Tabulo  
142/JES&NE  
143/Persone  
144/Esperantonytt

## Hit ska du komma i mitten av maj!

**Plats:** Nyköping  
**Tid:** 14, 15 och 16 maj

Vad kommer att hända under dessa dagar i Nyköping? Esperantoförbundets årskongress förstås!

Nyköping är en stad som just nu saknar en esperantoklubb, men den saknar sannerligen inte esperantoverksamhet! Kan en bra kongress hjälpa till att få igång en ännu större verksamhet? Det är vad Esperantoförbundet och de lokala förmågorna hoppas på.

Årskongressen startar "mjukt" på fredag med några styrelsemöten och en "spontan afton". Det är en bra idé att vara på plats redan på kvällen: Esperantoförlagets årsmöte äger rum redan kl. 8.30 på lördag morgon. Annars är förmiddagen bokad för olika aktiviteter på Stora Torget. En skolorkester är engagerad att dra uppmärksamheten till vår del av torget, dvs vid Stadshustrappan. Mellan kl. 10 och 12 anordnas en snabbkurs i esperanto för intresserade, i anslutning till torgaktiviteterna och utställningen på biblioteket.

Två esperantointresserade teckningslärare har en utställning om esperanto på Stadsbi-

lioteket.

Lärare är vad dagarna i Nyköping kommer att handla om. Några av våra medlemmar som hör hemma i det svenska skolsystemet kommer att presentera var sitt avsnitt vid en speciell träff för inbjudna lärare. Denna informationsträff ingår inte i kongressen, men inträffar samtidigt.

Vad som ingår i kongressen är ett föredrag om "Esperanto i skolan" av prof Istvan Szerdahely från Budapest, den verkliga experten på detta område. Av de övriga punkterna kan man nämna Esperantoförbundets årsmöte, olika diskussionsgrupper, en ornitologisk utflykt till Hallbosjön mm.

För att få vara med ska man anmäla sig genom att betala 75 kronor (SEJU-medlemmar 50 kronor) till postgiro 66 41 50-0, Esperantoförbundet. Avgiften inkluderar en gemensam måltid, den på lördag kvällen. Du kan bo på hotell (Eso Motorhotel är bokad; där kostar ett rum 210 kr per natt, för en, två eller tre) eller på vandrarhem. Ange på inbetalningskortet vad du vill att man ska boka åt dig, och om du vill dela rum.

Nyköping alltså, den 14, 15 och 16 maj i år!

## UNGDOMSSPALT

Sveriges Esperantisters Ungdomsförbund (SEJU) är namnet på Esperantoförbundets ungdomsorganisation. Från och med nu kommer SEJU att ha en fast rubrik i *La Espero*. Där kan du läsa om SEJUs aktiviteter och om annat som kan intressera både unga och gamla. Redaktör för SEJU-spalten kommer Leif Gunnar Nordenstorm att vara. Adress: Studentvägen 22:19, 752 34 Uppsala.

## BÄLLINGE I MAJ

I Bällinge, 15 km norr om Uppsala, kommer SEJUs största arrangemang på länge att äga rum 19 – 23 maj 1982. Det kommer att bli tillfälle till att delta i kurser, idrott, teater och mycket annat. Temat blir mat från olika länder, så vi kommer att få tillfälle att prova många olika läckerheter. Vi hoppas på deltagare från många länder. Mer om denna träff senare, men du gör klokt i att boka dessa dagar redan nu.

## KURSER I INDIEN

I staden Kozhikode i Kerala i södra Indien finns en katolsk skola där fader Henry Josef Cmi under lång tid har undervisat i esperanto. Eleverna tillhör fattiga familjer och har inte råd att beställa några böcker eller tidningar på esperanto. Nu får du chansen att hjälpa till! Samla ihop tidningar och böcker som du redan läst, eller köp några nya, och sänd dem till Indien. Särskilt välkomna är lättläst litteratur och engelsk-esperantiska och esperanto-engelska ordböcker.

Deltagarna i kursen är pojkar i sjuttonårsåldern och katoliker. Några av dem kommer att bli munkar. De vill gärna brevväxla

med svenskar, men vill gärna att den som skriver skickar med en internationell svarskupong, som kan köpas på posten här i Sverige. Den kan sedan lösas ut mot frimärken i Indien. Pojkarna heter: Paul K.T., Francis Skaria, Jacob K.T., Joseph Thomas, Baby Jacob, Lukose V.V. Adressen är Amala Hostel, Devagiri, Kozhikode 673 088, Kerala, Indien.

## LA KANCERKLINIKO

är en tidning om politik och kultur, med noveller, poesi och serier. Kommer med fyra nummer om året. Du kan prenumerera genom att betala 45 kronor till postgiro 80 97 12-3, Leif Gunnar Nordenstorm.

# Använd biblioteken och låna böcker

Har du märkt att det finns intresse för det internationella språket esperanto hos personalen i våra lånebibliotek? Varför inte ta vara på detta!

Stadsbiblioteket i Skövde har flera gånger gjort ansenliga

inköp av esperantolitteratur. En lista över sådana böcker i bibliotekets ägo har färdigställts och skickats ut till länets övriga bibliotek. I biblioteket har böckerna ställts upp så att man kan få en god översikt av vad som finns.

Av senare inköp kan nämnas: Brecht B, *Trigroša romano*; Kri-  
lov I, *Elektitaj fabeloj*; Tegner, *Frithiofs saga*.



Stifts- och landsbiblioteket i Skara har köpt ordböcker men också annat, exempelvis V Lebrun: *Leo Tolstoj*, Ibsen: *Brand*, Szerdahely *Krestomatio de esperanta literaturo*. Den sistnämnda förtjänar att bli lånad och läst av många.

Stadsbiblioteket i Lidköping har inköpt en vacker kollektion barnböcker på esperanto, bland annat *Asteriks*, *Infanoj en la mondo*, *Konstrui novan ponton*.

Glöm inte att låna!

Bengt Alsén

# TILL ANTWERPEN?

Årets internationella esperantokongress kommer att äga rum i Antwerpen i Belgien. Du längtar säkert att få vara med! Gör slag i saken — anmäl dig nu! Den 1 april går avgifterna upp igen!

Beställ anmälningsblankett från Asta Schaedel, V. Rönneholmsvägen 42 B, 217 41 Malmö, telefon 040-91 63 09. Fyll i blanketten och sänd den tillbaka till samma adress.

Postgironumret för avgiften är 14 74 29-5, Sv. sperantoförbundet, Specialkonto. Du betalar enligt följande tabell:

1 Icke medlem i UEA	498 kr
2 Medlem med årsbok	429 kr
3 Medlem med årsbok och 'esperanto'	335 kr
4 Make/maka till (1)	345 kr
5 Make/maka till (2) eller (3)	303 kr
6 Ungdom t o m 20 år	148 kr
7 Heltidsstuderande t o m 30 år	249 kr
8 Synskadad	201 kr

# Antwerpen

# BABELS TORN

## Skåms svenska folket för sitt språk? DN

Lördagen den 17 oktober 1981

### radio/tv *spegeln*

□□□ Jag förstår inte vad det är för roligt med att få en tårta i ansiktet, en spark i röven, ramla från femte våningen, få en hink med färg över huvudet eller att vid en hetsig

#### sett i tv

jakt och i sin finaste kostym ramla i en bassäng fylld med krokodiler. Ingredienserna är välkända från Chaplinfilmer och mer eller mindre samma slags "humor" fanns också i "En jäkel till doktor" förra lördagen. Om filmens huvudrollsinnehavare Jerry Lewis skrev en kvällstidning i en stor artikel att han är världens störste komiker. Jag bara undrar om artikelförfattaren eller gubbarna på TV med för den delen någonsin hört talas om en liten flintskallig fransman vid namn Louis de Funés?

□□□ Ett par timmar senare i samma kanal var det uppdukat för mera "muppkultur" (mitt uttryck för 98 procent av all importerad angloamerikansk "kultur") med självaste "Mupparna", som barn upp till 6-7 år skratrar åt enbart för dessa figurers överdrivet löjliga utseendes skull medan de upp till 108 njuter av deras "roliga" skämt. Men från och med den 31 oktober kommer grannkanalen TV 2 att tillgodose även tvååringarnas behov av denna "högklassiga" underhållning, med tanke på att de ännu ej kan engelska, i en serie med de välkända mupppigurerna fast dubbade till svenska. LEVE MUPPKULTUREN!

□□□ Som den nattmänniska jag är tänkte jag avsluta förra fredagskvällen, med att koppla av med lite svensk sång och musik från musikkrogen Kristina. Tvåans nya "svenska" underhållningsserie. Men ack, vad jag bedrog mig, när jag såg hur alla dessa glada amatörer som hungrar efter berömmelse lätt spottade fram sina låtar på muppiska (engelska), förstås, inför den inhemska och entusiastiska krogpubliken, oj, vad jag blev bedrövad.

□□□ Till skillnad från "På Kristina"-redaktionen har "Måndagsbörsen" av någon anledning avsevärt mera pengar att röra sig med och trots att det en och annan gång händer att någon internationell mupp-pop-rockstjärna sviker dem så "håller" programmet i övrigt standarden. Eller rättare sagt Sveriges tråkigaste karl, Jonas Hallberg, lyckas gång på gång med sin uppgift att hålla svenska folkets förkärlek för muppkulturen vid liv.

□□□ En viss opposition börjar växa fram för att bryta muppterrorn i det svenska kulturlivet. Nyligen protesterade en rad kända svenska musiker som känner sig helt utfrusna från muppradion (P 3) vars utbud Britt Edwall med all rätt kallar invandrarprogram för amerikaner. Men varför är det så tyst i övrigt? SKÅMS VERKLIGEN SVENSKA FOLKET FÖR SITT SPRÅK OCH SIN KULTUR? I så fall förvånar det mig att svenska myndigheter ännu inte har förbjudit det svenska språket till förmån för den avgudade engelskan.

GAKIS VASILIOS

# La ĝusta uzo de 'olimpiado'

Trafoliumante Starton (1981:3) mi trovis la artikolon "Esperanto-olimpiado 1981". Leginte la tekston mi konstatis, ke denove temas pri erara uzo de la vorto "olimpiado". Jen aliaj citaĵoj, kiujn mi kolektis en mia dosiero pri malĝusta lingvouzo en esperanto:

1. Jugoslavia leganto, en letero al la redakcio de *Esperanto* en januaro 1961 menciis "la roma Olimpiado" kaj "la sekvonta olimpiado en Japanujo".

2. La hungara aŭtoro Teodoro

S. Svarc skribis en sia aŭtobiografia romano *Maskerado ĉirkaŭ la morto* (1965): "En la jaro 1936 la vintra olimpiado estis en Germanujo ..."

3. "La olimpiado de Melburno" kaj "la olimpiado 80" estas esprimoj troviĝantaj en artikolo verkita de esperantistino el Kievo, aperinta en *Kolektanto* (1979:3-4).

4. Ankoraŭ unu citaĵo estas ĉerpita el raporto pri junulara tendaro, publikigita en *Bulgara esperantisto* (1980:9): "Ili kon-


kuris en malgranda SEJT-olimpiado".




Laŭ la kunteksto de la kvar citaĵoj, la vorto "olimpiado" rilatas al sportaj agadoj, kiuj kutime nomiĝas en esperanto "olimpiaj ludoj" aŭ "olimpikoj". La unuaj tri verkintoj pritraktas la mondfamajn internaciajn ludojn, dum la kvara raportinto priskribas sportkonkursojn en tendaro de junaj esperantistoj. En la artikolo en *Starto* la esperanto-olimpiado temas ne pri sportarango sed pri lingvokonkurso.

Kion vere signifas "olimpiado" en esperanto? *Plena ilustrita vortaro* difinas ĝin jene: "kvarjara intervalo inter la olimpiaj ludoj, uzata kiel tempokalkula maniero ĉe la helenoj". Ĝi do ne estas speco de konkurso, sed kalendara mezurunuo de la helena kronografio.

La originaj helenaj olimpiaj ludoj, kiuj okazis ĉiun kvaran jaron, estis nomataj *olympias*, "olimpiado". Tiu termino estis aplikata ankaŭ al la kvarjara periodo konsistanta el la jaro, en kiu la ludoj okazis, kaj la sekvaj tri jaroj. La listo de venkintoj en la olimpikoj donis eblon uzi la kvarjarajn periodojn de la olimpianoj kiel elementojn de kronografia kadro, en kiu la numero de la olimpiado estas donita, kelkfoje kune kun la numero de la kvarjara ciklo. Surbaze de eventoj datitaj en olimpianoj jaroj fare de aŭtoroj en la antikveco, estas eble retrokalkuli por starigi la komencigon de la epoko: 776 a.K. = OL1.1, t e la unua jaro de la unua olimpiado (OL).

*Plena ilustrita vortaro* klare diferencigas "olimpiado" disde "olimpiaj ludoj" aŭ "olimpikoj". Tiuj ĉi terminoj estas uzeblaj aŭ por la historiaj helenaj ludoj aŭ por la modernaj internaciaj sportkonkursoj, kiuj debutis en 1896. "Olimpiado" havas nur unu signifon: "kvarjara tempo-intervalo". La konfuzo rilate la signifon de "olimpiado" rezultas el etnolingva influo. En kelkaj lingvoj vorto simila al "olimpiado" estas uzata por ludoj, kaj tiu naciismo ensteliĝas en la esperanton de parolantoj de tiuj lingvoj. Bedaŭrinde esperanto-vortaroj ne ĉiam atentigas konsultantojn pri tio.



**MATENAJ FLOROJ,  
KOLEKTITAJ EN VESPERO**

*av Lusin. Berättelser om minnen från barndom och studietid. Lusin (1881 - 1936) är en känd samhällskritisk kinesisk författare som fortfarande översätts, bl a till svenska. 158 sid.*

15,- kr

**KARNAVALETO  
DE OLIVIER TZAUT**

*Kassett med ett nytt urval visor från olika hörn i världen, och två med originaltext på esperanto.*

80,- kr

**LA TUNDRO ĜEMAS,  
DE V EROŜENKO**

*Eroŝenko levde 1929 hos tjuk-tjerna, ett litet folk i Sibiri-en. 82 sidor.*

38,- kr

- Sänd din beställning till EsperantoCentro, Brönsgatan 21, 111 38 Stockholm.
- Sätt in vad böckerna kostar på postgiro 20 12 - 3, Esperantoförbundet, så slipper du fakturaavgift på 5,- kr.
- I priserna ingår moms och porto. (Reservation för ändring av valutakurser, moms med mera).

Esperantoförlaget

Bernard Golden

# August Strindberg: Duona paperfolio

La lasta meblotransporto jam iris: la luanto, juna viro kun funebra krepo sur la ĉapelo, trairis ankoraŭ foje la loĝejon por vidi, ĉu li forgesis ion. — Ne, li ne forgesis ion, absolute nenion; kaj li eliris en la halon, firme decidinta ne plu pensi pri tio, kion li travivis en ĉi tiu loĝejo. Sed jen, en la halo, apud la telefono, pendis duona paperfolio fiksita per najletoj; kaj ĝi estis plenskribita per pluraj manskriboj, io zorge per inko, alio skribaĉita per nigra aŭ ruĝa kraĵono. Tie estis la tuta bela historio, kiu okazis dum la mallonga tempo de du jaroj; ĉio, kion li volis forgesi, estis notita tie; unu homa vivo sur duona paperfolio.± Li deprenis la folion; estis sunflava malnetpapiro, kiu reflektas la lumon. Li metis ĝin sur la apogon de la salona kahelforno kaj, klinita super ĝi, li legis ĝin. Unue estis notita ŝia nomo: Alice, la plej bela nomo, kiun li tiam konis, ĉar estis la nomo de lia fianĉino. Kaj la numero — 151,1. Aspektis kiel psalmonumero en la preĝejo. Sub tio: Banko. Estis lia laborejo,

la sankta laboro, kiu donis la panon, hejmon kaj la edzinon; la bazon por la ekzisto. Sed ĝi estis forstrekita! Ĉar la banko bankrotis, sed li saviĝis al alia banko, sed post mallonga periodo kun multa malkvieto.

Poste estis notite: Florvendejo kaj Fiakristo. Estis la gefianĉiĝo, kiam li havis la poŝon plenan je mono.

Poste: Meblovendisto, Tape-tisto. Li pretigis la hejmon. Transportejo: ili enloĝigas sin.

Biletejo de la operejo: 50.50. Ili estas novgeedzoj kaj iras al la operejo en la dimanĉoj. Iliaj plej belaj momentoj, kiam ili mem sidas silentaj kaj renkontiĝas en la belo kaj harmonio en la fabellando sur la alia flanko de la kurteno.

Ĉi tie sekvas vira nomo, kiu estas forstrekita. Estis amiko, kiu atingis iom altan pozicion en la socio, sed ne povis elteni la feliĉon, sed falis, senhelpe, kaj devis veturi longen for. Tiel fragile estas!

Ĉi tie io nova aperis en la vivo de la geedzoj. Estas skribite, per virina mano kaj kraĵono: "La



virino". Kiu virino? — Ja, ŝi kun la granda mantelo kaj ĝentila kompata vizaĝo, kiu venis tiel silente kaj neniam iris tra la salono, sed ĉiam uzis la koridoron por atingi la dormĉambron.

Sub ŝia nomo estas notita Doktoro L.

Por la unua fojo aperas ĉi tie la nomo de parenco. Estas skribite "Panjo". Estas la bopatrino, kiu diskrete tenis sin flanke por ne ĝeni la novgeedzojn, sed estis nun vokata en momento de bezono kaj venas ĝoje, ĉar ŝi estas bezonata.

Ĉi tie komenciĝas granda skribaĉado per blua kaj ruĝa kraĵonoj. Komisiejo: la virino foriris, aŭ novan oni dungos. Apoteko. Hm! Malheliĝas! Lakto-centralo. Tie oni mendas lakton, sentuberkulozan.

Spicejo, Buĉisto ktp! La domo estas zorgata per telefono; tiam la mastrino ne estas sur sia loko. Ne, ĉar ŝi kuŝas en la lito.

Tion, kio sekvis, li ne povis legi; ĉar ekmalheliĝis antaŭ liaj okuloj, kiel devas okazi kun droniĝanto en la maro, kiam li devas vidi tra la akvo. Sed tie estis notite: Entombigejo.


Tio diras sufiĉon! — Unu granda kaj unu malgranda, subkomprenite, kestoj. Kaj parenteze estis skribite: el polvo.

Poste nenio alia estis skribita! Ĝi finiĝis per polvo, kaj tiel estas.

Li prenis la sun-paperon, kisis ĝin kaj metis en sian brustoposon.

En du minutoj li travivis du jarojn de sia vivo.

Li ne estis kurbita, kiam li eliris; li kontraŭe tenis sian kapon alta, kiel feliĉa kaj fiera homo, ĉar li sentis, ke li tamen estis havinta la plej belon. Kiom da malfeliĉuloj neniam havis tion!





**Strindberg publikigis volumon da fabeloj en 1903. Kelkaj estas evidente verkitaj sub la influo de HC Andersen, kiun li admiris, aliaj estas strindbergaj noveletoj. Du el ili aperas ĉi tie. La tradukon faris Franko Luin.**

## Plebejo trovas la orsplenon

La riĉulo iun fojon venis al la malriĉa insulo kaj enamiĝis en ĝin. Kial, la riĉulo ne povis diri, sed li estis ravita; eble tiu insulo similis al forgesita infanmemoraĵo aŭ al bela sonĝo.

Li aĉetis la insulon, konstruis vilaon kaj plantis ĉiaspecajn agrablajn arbojn, arbustojn kaj florojn. La maro kuŝis tie; propran kajponton li havis kun standardo kaj blankaj boatoj; kverkoj grandaj kiel preĝejoj ombrigis lian domon kaj freŝaj ventoj karese blovis super verdigantaj herbejoj. Li havis edzinon, infanojn, servistojn, tirbestojn; li havis ĉion, sed io mankis al li; estis malgravaĵo, sed plej grava el ĉio, li forgesis pensi pri ĝi: estis fontakvo. Oni fosis putojn kaj truigis rokojn, sed elvenis nur sala, bruna akvo. Oni filtrigis ĝin, ĝi fariĝis klara kiel kristalo, sed restis sala. Tie kuŝis la ĉagreno.

Alvenis tiutempe favorato de la Sinjoro, kiu havis bonŝancon en ĉiuj siaj okupiĝoj kaj estis unu el la plej famaj homoj de la mondo. Ni memoras, kiel li per sia diamanta bastono batis la rokon kaj, kiel Moseo, igis la ŝtonon doni akvon. Nun oni diamantboros, same kiel oni boris en aliajn rokojn kaj ricevis akvon el ili ĉiuj. Oni boris ĉi tie; por cent taleroj, por mil, por pluraj miloj, sed oni nur ricevis salan akvon. Ĉi tie evidente mankis beno; kaj la riĉulo bone rimarkis, ke oni ne ricevas ĉion por mono, eĉ ne gluton da freŝa

akvo, kiam oni havas malbonŝancon.

Li fariĝis melankolia kaj la vivo ne plu ridis. La lernejestro sur la insulo komencis legi malnovajn librojn, kaj venigis maljunan saĝulon, kiu uzis divenvergon; sed tio ne helpis.

Sed la pastro, kiu estis pli saĝa, kunvokis iun tagon la lernejanojn kaj promesis premion al tiu, kiu povos trovi herbon, kiu nomiĝas orspleno kaj indikas fontovejnoj.

— Ĝi havas florojn kiel alĉemilo kaj foliojn kiel saksifrago. Kaj aspektas orpolve kovrita sur la plej supraj folioj. Memoru tion!

— Florojn kiel alĉemilo kaj foliojn kiel saksifrago, ripetis la infanoj; kaj ili kuradis en arbaron kaj sur kampojn por serĉi la orsplenon.

Neniu el la infanoj trovis ĝin. Knabeto ja venis hejmen kun eŭforbio, kiu estas iom flava je la supro; sed ĝi estas venena, kaj la alia ne estas. Kaj ili laciĝis serĉi.

Sed estis knabineto, kiu ankoraŭ ne iris al lernejo; ŝia patro estis dragono, posedis farmeton, estis pli malriĉa ol riĉa. Lia sola trezoro estis la filineto; kaj ŝin oni en la vilaĝo nomis per la bela nomo Plebejo, ĉar ŝi ĉiam estis vestita en ĉielblua trikita jako kun larĝaj manikoj, kiuj swingiĝis, kiam ŝi moviĝis. Plebejo estas cetere malgranda papilio, kiun oni vidas plensomere sur herberoj, kaj kies flugiloj similas al la petaloj de la linfloro, fluganta linfloro kun antenoj, kie la

pistiloj situas.

Plebejo, tiu de la dragono, estis nekutima infano, kiu parolis saĝece sed kurioze, tiel ke neniu sciis, de kie ŝi havas la vortojn. Ĉiuj homoj ŝatis ŝin, kaj ankaŭ la bestoj; kokinoj kaj bovidoj sekvus ŝin, kaj ŝi kuraĝis frapeti la virbovon mem. Ŝi ofte eliris sola, forestis, kaj revenis; sed kiam oni demandis, kie ŝi estis, ŝi ne povis diri tion. Ŝi tiam tamen havis multon por rakonti. Ŝi vidis malkutimaĵojn, kaj renkontis kaj virojn kaj virinojn, kiuj diris tion kaj tion. La dragono ne malhelpis ŝin, ĉar li ŝajnis rimarki, ke ŝi havas iun, kiu protektas ŝin.

Iun matenon Plebejo eliris por vagadi. Tra herbejoj kaj arbaretoj ŝi direktis siajn paŝetojn; kaj ŝi kantis plejparte por si mem, kantojn, kiujn neniu antaŭe aŭdis kaj kiujn ŝi elpensis. La matena suno brilis junece, kiel se ĝi estus novnaskita, la aero sentiĝis fortika kaj satdorminta, la roso vaporigis kaj ĝia freŝa malseko malvarmigis la etan vizaĝon.

Kiam ŝi envenis la arbaron, ŝi renkontis verde vestitan viron.

— Bonan tagon, Plebejo, diris la viro. Mi estas ĝardenisto sur Sun-maldensejo. Venu kun mi kaj rigardu miajn florojn.

— Tro granda honoro por mi, respondis Plebejo.

— Ne, ĉar vi neniam suferigis plantojn.

Tiel ili iris kune kaj venis al la marbordo. Tie estis bela ponteto, kiu kondukis al insuleto, kaj tien ili iris.

Kia ĝardeno! En ĝi troviĝis ĉio, granda kaj malgranda, kaj estis ordigita kiel libro.

Li mem loĝis en domo konstruita el kreskantaj ĉiamverdaj arboj, pinoj, piceoj, juniperoj kun pingloj; la plankoj estis pretigitaj el kreskantaj ĉiamverdaj arbustetoj kaj herboj. Muskoj kaj likenoj kreskis en la fendoj de la planko por izoli; empetro, ursbero, lineoj stigis la plankabulojn. La plafono konsistis el ramplantoj: ampeploso, kaprifolio, klematido, hedero; kaj ĝi estis tiel densa, ke eĉ ne guto da pluvo trairis.

Ekster la pordo staris abelujoj, sed anstataŭ abeloj loĝis en ili papilioj. Kaj kiam ili elsvarmis, tio estis vidindaĵo.

— Mi ne ŝatas suferigi abelojn, diris la viro. Kaj cetere ili estas tiel



malbelaj: ili aspektas kiel vilaj kafgrajnoj, kaj ili pikas ankaŭ, kiel viperoj.

Kaj ili eliris en la ĝardenon.


— Nun vi legos en la aboco-libro de la naturo, vi ekscios la sekretojn de la floroj kaj la sentojn de la herboj. Sed vi ne rajtas demandi, nur aŭskulti kaj respondi ... Vidu, infano; sur tiu griza ŝtono kreskas io, kio similas al grizpapero. Tio venas unue, kiam la roko malsekiĝas. La roko ŝimas; la ŝimo nomiĝas likenoj. Ĉi tie ni havas du specojn; unu similas al kornoj de boaco; ĝi ankaŭ nomiĝas boaclikeno, kaj estas la ĉefa manĝaĵo de la boaco. La alia nomiĝas islanda likeno kaj similas ... Al kiuj ĝi similas?

— Ĝi similas al pulmo, ĉar tiel estas skribite en la naturscienca libro.

— Jes, ĝi tra lupeo similas al la aervezikoj de la pulmo kaj el tio la homoj lernis uzi ĝin kontraŭ brustmalsanoj, vi sciu. — Sed nun, ĉar la roklikenoj kolektis humon, venas la muskoj. Ili havas iaspecajn simplajn florojn kaj ili semiĝas; ili similas al la glacifloroj sur la fenestrovitro, sed vi vidos, ke ili ankaŭ similas al eriko, kaj koniferoj kaj ĉio ebla, ĉar ĉiuj plantoj estas parencaj. Ĉi tiu plumomusko aspektas kiel piceo, sed havas semkapsulojn kiel papavo, nur pli simplajn. Sur la muskoj baldaŭ kreskas eriko. Se vi rigardas la erikon tra tre grandiga lupeo, ĝi fariĝos epilobio, aŭ rododendro, same kiel ulmo, kiu nun estas granda urtiko. La humtapiŝo estas preta, kaj en la humo ĉio kreskas. La homo por sia utilo kaptis kelkajn plantojn, sed la naturo mem donis al li indikojn, kiujn li prenu, kaj kiel li utiligu ilin ... Tio ne estas pli stranga ol la ornamoj kaj koloroj, kiujn la floroj ricevis por diri al la insektoj, kie la mielo troviĝas. Vi mem vidis la sekalan spikon, kie la bakista ilaro pendas ekstere kiel bakistŝildo. Kaj se vi rigardas la linon, la plej utilan el ĉiuj plantoj, ĝi mem instruis al la homoj ŝpini. Rigardu en la floron, kaj vi vidos la linfaskon, kie la pistiloj tordiĝas ĉirkaŭ la stiluso kiel stupoj ĉirkaŭ spindelo. Por esprimi sin pli klare la naturo igis parazitan herbeton nomata Kuskuto volviĝi ĉirkaŭ la tuta planto, supren-malsupren, tien-reen kiel la navedo en teksilo. Strange estas, ke ne estis

homo, sed papilio, kiu unue eltrovis, ke oni povas ŝpini la linon. Ĝi nomiĝas linvolvulo; kaj el la folioj ĝi ŝpinas per sia propra silko malgrandajn lulilkovrilojn kaj luliltukojn por siaj idoj. Sed depest kiam oni kulturis linon, ĝi ruze atentis la tempon, tiel ke ĝiaj idoj estas flugpretaj tuj antaŭ ol la lino estas rikoltota.

Kaj la medicinplantoj, vi sciul Rigardu tiun grandan papavon; fajre ruĝa kiel febro kaj frenezo! Sed je la fundo de la floro estas nigra kruco; tio estas la venensigno de la apotekistoj. Kaj meze en la kruco staras romia vaso kun sulketoj. Tiujn sulketojn oni tranĉetas, tiel ke elfluas la medikamento, kiu povas alporti morton, se erare uzata; sed povas alporti la ĝentilan fraton de la morto, la dormon, se uzata ĝuste. Jes, tiel saĝa kaj donacema estas la naturo. Sed nun ni rigardu la Orsplenon.



Ĉi tie li faris paŭzon por vidi, ĉu Plebejo fariĝas scivolema. Sed ŝi ne estis.

— Nun ni rigardos la orsplenon.

Denove paŭzo! Ne, Plebejo kapablis silenti, kvankam ŝi estis tre malgranda.

— Nun ni rigardos la orsplenon, kiu havas la florojn de alĉemilo kaj foliojn de saksifrago. Tio estas ĝia karakterizaĵo kaj ĝi diras, kie troviĝas fonto. La alĉemilo kolektas kaj roson kaj akvon en siaj folioj, ĝi estas mem malgranda klara fonto; sed Saksifrago krevigas rokojn. Sen rokoj vi ne havos fonton, kiel ajn longe for la roko estu. Tion diras la orspleno al tiuj, kiuj komprenas. Ĝi kreskas ĉi tie sur la insulo kaj vi ekscios pri la loko, ĉar vi estas ĝentila. El via maneto la riĉulo ricevos la freŝan akvon



por sia seka animo, kaj per vi ĉi tiu insulo fariĝos benita. Iru en paco, infano mia. Kiam vi venos en la nuksarbaron, vi trovos dekstre arĝentan tilion; sub ĝi kuŝas angviso, kiu ne estas danĝera. Ĝi montros al vi la vojon al la orspleno. Sed antaŭ ol vi iros, donu kison al ĉi tiu viro, sed nur, se vi mem volas.

Plebejo etendis sian buŝeton al la viro kaj kisis lin. Tiam la vizaĝo de la viro ŝanĝiĝis, kaj li staris tie kvindek jarojn pli juna.

— Mi kisis infanon, mi ricevis junecon! diris la ĝardenisto; kaj vi ne ŝuldas dankon al mi. Adiaŭ!

Plebejo iris al la nuksarbaro. Tie muzikis la arĝenta tilio kaj plue la burdoj kantis en la tilifloraro. La angviso tute prave kuŝis tie, sed ĝi aspektis, kiel se ĝi estus verdigrinta ion.

— Jen tie estas Plebejo, kiu ricevos la orsplenon, diris la angviso. Vi ricevos ĝin, sed je tri kondiĉoj: ne klaĉu, ne mensogu, ne estu scivolema. Iru nun rekte antaŭen, kaj vi trovos la orsplenon.

Plebejo iris rekte antaŭen. Tiam ŝi renkontis virinon.

— Bonan tagon, diris la virino. Ĉu vi estis ĉe la ĝardenisto en Sun-maldensejo?

— Bonan tagon, sinjorino, respondis Plebejo kaj pluiris.

— Vi almenaŭ ne klaĉas, diris la virino.

Poste ŝi renkontis ciganon.

— Kien vi iras? la cigano demandis.

— Mi iras rekte antaŭen! Plebejo respondis.

— Vi almenaŭ ne mensogas! diris la cigano.

Poste ŝi renkontis laktoportiston. Sed ŝi ne povis kompreni, kial la ĉevalo sidis en la ĉaro kaj la laktokoĉero estis jungita ĉe la timono kaj tiris.

# TEMO FABELOJ

— Nun mi senbridiĝos, diris la koĉero kaj ekkuregis, tiel ke la ĉevalo falis en vojfoŝaĵon ... Nun mi akvumos la sekalon, diris la koĉero kaj deprenis kovrilon de laktobotelo por akvumi la kampon.

Plebejo opiniis tion stranga, sed ŝi ne rigardis tiudirekten, sed pluiris.

— Vi ankaŭ ne estas scivolema, diris la laktokoĉero.

Kaj nun Plebejo staris apud roko; la suno brilis inter la avenuoj sur verdan strion de suka herbo, kiu brilis kiel plej pura oro.

Estis la orspleno; kaj Plebejo vidis, kiel ĝi sekvis la fontvejon de la roko en la riĉulan kampon.

Tiam ŝi falis surgenuen kaj kolektis tri orsplenojn, kiujn ŝi kaŝis en sian antaŭtukon; kaj kun ili ŝi hejmeniris al sia patro.

La dragono surmetis la kaskon, la sabron kaj la jakon; kaj ili iris al la pastro. Poste ili ĉiuj tri kuniris al la riĉulo.

— Plebejo trovis la orsplenon! la pastro diris, kiam li eniris tra la salonpordo. Kaj nun la tuta vilaĝo riĉiĝos, ĉar nun ni fariĝos banloko!

Kaj fariĝis banloko; venis vaporboato kaj komercistoj; establiĝis gastejo kaj poŝtoŝeĉejo, kuracisto kaj apoteko. Oro fluis dumsomere en la vilaĝon, kaj estis la fabelo pri la orspleno, kiu povis krei oron.

Pluraj vortoj en la supra fabelo bezonas klarigon kaj ne troveblas en vortaroj: **plebejo** estas "allmän blåvinge" (*Plebejus argus*); **orspleno** estas "gullpudra" (*Chrysosplenium alternifolium*); **empetro** estas "kråkris" (*Empetrum nigrum*); **ursbero** estas "mjölon" (*arctostaphylos uva-ursi*); **lineo** estas *Linnæa borealis*; **boaclikeno** estas "renlav", kadonio en vortaroj; **kuskuto** estas "nässelsnärlja" (*Cuscuta europæa*)

**BÖCKER  
FRÅN HELA  
VÄRLDEN**



ELEKTITAJ FABELOJ  
DE FRATOJ GRIMM


Omtryck av utgåvan från 1906.  
28 kända sagor, bl a Hans och Greta och Askungen. Tryck och bindning är ojämnt men läsligt!

76,- kr

TRIDEK ROLULOJ  
DE STEFAN MACGILL

Sketcher för nybörjare, med övningsuppgifter.

26,- kr



RAKONTOJ EL UNUA POŜO KAJ  
RAKONTOJ EL LA DUA POŜO


av Karel Čapek. Ett femtiotal korta korta berättelser, översatta från tjeckiska. 288 sidor.

31,- kr

LA GRAMATIKA KARAKTERO  
DE LA ESPERANTAJ RADIKOJ

Omtryck av Kalocsays pamflett från 1938. Trycket är dåligt men läsligt.

15,- kr



NOVA VORTARO  
ESPERANTA-ĈINA

Ordbok i fickformat, utgiven i Peking. 328 sidor.

30,- kr

- Sänd din beställning till EsperantoCentro, Brunnsgatan 21, 111 38 Stockholm.
- Sätt in vad böckerna kostar på postgiro 20 12 - 3, Esperantoförbundet, så slipper du fakturaavgift på 5,- kr.
- I priserna ingår moms och porto. (Reservation för ändring av valutakurser, moms med mera).

Esperantoförlaget



# Ne nur leteroj de plum-amikoj (8)

## KELKAJ SPECIALAJ VERKOJ

La plej grandskala kaj valora konsultlibro pri esperanto estas nun *Esperanto en perspektivo*, kiu, aperinte en 1974, restas relative ĝisdata. Tiu libro estas dolore kosta, sed kompare kun la nuntempaj prezoj ne nur de grandaj konsultlibroj, sed de efemeraj libroj, ĝi estas bonaĉeto. Ĝi devus minimume troviĝi en bibliotekoj, kien iras homoj, kiuj montras seriozan intereson pri esperanto.


Enkonduka libreto, kiel la nuna, ne povas ne iom distordi la perspektivojn per necesa elekto kaj simpligado. Personaj gustoj neeviteble sin trudas iom; personaj sciomankoj ankaŭ povas misirigi. La leganto, kiu deziras multe pli detalajn informojn, kaj vidi la foliojn sur la arboj ĝis nun viditaj nur en impresionisma pentraĵo, turnu sin al *Eperanto en perspektivo*. Kompreneble ne uj povus aprobi ĉiun vorton en librego 844-paĝa kaj dense presita. Sed la libro estas ege faktoriĉa, ĝenerale tre klarstila kaj verkita de seriozaj, dediĉitaj fakuloj. Kompreneble ĝi estas fonto de informoj ne nur pri literaturo, sed ankaŭ pri multaj aliaj temoj pri esperanto, ekzemple teoriaj demandoj, instruado, kulturaj interŝanĝoj kaj uzo de esperanto por praktikaj celoj, kaj la historio de la esperanto-movado. Sed la informoj pri literaturo estas la plej detalaj ĝis nun haveblaj en unu libro.

Alia valora konsultlibro estas la duvoluma *Enciklopedio de esperanto* de 1933, kiu enhavas pli longajn artikolojn pri diversaj libroj, aŭtoroj kaj aliaj interesaj temoj. En 1980 ĝi estis represita senŝanĝe kaj estas denove havebla; sed ĝi kompreneble estas tre eksdata. Espereble ne pasos tro multaj jaroj antaŭ la apero de la nun verkata nova *Enciklopedio*.

Tiu, kiu nun apenaŭ komencis sian seriozan studadon pri esperanto, verŝajne uzis ĉefe ian

vortaron nacilingvan-esperantan. Tiam vortaron ĉiu bezonas. Mi esperantistiĝis en 1949 kaj, iom mirige al mi mem, estas anino de la Akademio de esperanto; kaj ankoraŭ preskaŭ ĉiutage mi konsultas anglan-esperantan vortaron, se nur por kontroli ion. Oni neniam posedas vortojn por ĉio, kion oni deziras diri.

Tiu, kiu volas profundigi en lingvon kaj plene kompreni ĝian



literaturon, tamen ne restu ĉiam ĉe la stadio de nacilingvalilingva vortaro nur. Iam oni devas turni sin al vortaro tia, kian uzas la nacilingvano; en la kazo de esperanto la vera kvazaŭ-nacilingva internacilingvano. Oni tiam rapide rimarkos, kiel la nova vortaro pligrandigas la komprenon pri la lingvo kaj la nuancojn de la literaturo.

Nacilingvaj-esperantaj vortaroj estas de tre diversaj niveloj de fidindeco. Foje ili iom erarigas pri nuancoj aŭ pri la vera internaciano de ia uzado. Ekzistas feliĉe du tre bonaj vortaroj esperantaj-esperantaj. La malgranda *Plena vortaro de esperanto*, kune kun sia *Suplemento* (kiu unue eldoniĝis aparte; sed la nuna poŝformata *Plena vortaro* inkluzivas la *Suplementon* kiel aldonon) estas tre valora normiga vortaro por ĉiuj, kaj aparte valora, ĉar ĝi enhavas

multajn ekzemplojn de akcepteblaj vortuzadoj el la verkoj de Zamenhof kaj kelkaj aliaj ĝenerale estimataj fruaj esperantaj verkistoj. Ĝiaj difinoj ofte tre helpas ne nur komprenon de unuopaj vortoj, sed komprenon de esprimrimedoj kaj internaciaj normoj de komprenado. Tiu, kiu volas vere studi la esperantan literaturon, nepre havigu al si la *Plenan vortaron*, se eble.

La *Plena vortaro* ekzistas en tre praktika poŝformata eldono, kiun oni povas sen troa ĝeno porti tien-reen, ekzemple dum vojaĝado aŭ al kurso. Oni preskaŭ bezonus kamelon por porti tien-reen la plej grandan vortaron esperanta-esperantan. La *Plena ilustrita vortaro*, 1300-paĝa, aperis en 1970, post multaj jaroj da heroe pacienca, malfacila kaj sindona laborado de Gaston Waringhien kaj multa helpo de multaj sindonaj fakspertaj kunlaborantoj. Ĝi estas inter la elstaraj erudiciaj verkoj de esperanto kaj, same kiel la grandaj fruaj vortaroj de naciaj lingvoj (kiel anglino mi tuj pensas pri la renoma angla vortaro de Samuel Johnson), ĝi havas profundan literaturan valoron kaj signifon. La difinoj estas tiel adekvataj, ke la libro estas iasence tre informa unuvoluma enciklopedio pri la sciencoj, artoj, geografio, religio, medicino ktp. Multegaj ekzemploj el literaturo helpas limigi kaj larĝigi normojn pri uzado. Kosta, peza, kaj ne por komencantoj, ĝi estas ege valora libro por tiu, kiu volas studi serioze; kaj ĝi estas vortaro ne nur konsultebla, sed vere ofte legebla, pro ĝenerala kultura intereso.


Vortaroj tre gravas por la evoluado de literaturo kaj eĉ de homa pensado, ĉar la eroj de eĉ la plej profunda artverko kaj de ĉiuj niaj pensoj estas, finfine, niaj unuopaj vortoj. Oni ne tro longe studu kun nesufiĉe altgrada vortaro.

Fine mi mencias tri librojn, kiujn mi povus alie ellasi, sed kiuj ŝajnas al mi aparte menciindaj.

La *Fundamenta krestomatia* de esperanto, aperinte en 1903, estas kompreneble nun iom eksdata stile kaj enhave. La nun aĉetebla eldono de 1954 enhavas multajn piednotojn pri stilaj arkaismoj aŭ dubaj punktoj. La libro restas tamen valora kolekto kaj aparte interesa por tiu, kiu

deziras studi la literaturon laŭ historia metodo, ĉar ĝi enhavas multajn alie nun ne haveblajn tradukojn de Zamenhof, multajn specimenojn de la verkaroj de pioniraj verkistoj, alie ne facile troveblaj, kaj eĉ multajn verkojn, ankoraŭ legindajn por si mem.

Oni nepre iam rigardu verketon ĉarman de Zamenhof, la *Proverbaro esperanta*. Tiu kolekto de esperantaj proverboj kaj konversaciaj idiotismoj naskiĝis kiel aldono al kvarlingva proverbaro, kiun preparis la patro de Zamenhof. Pro tio la ordo de la esperantaj proverboj impresas kiel iom kaprica. (Moderna eldono de la *Proverbaro*, redaktita de C. Rogister, 1961, prezentas la proverbojn en alfabeto



ordo kun indeksoj.) Ĝi estas ideala libreto por hazarda legado dum liberaj minutoj kaj tre bone donas ian senton kaj tonon de esperanto por la ĉiutaga vivo. Zamenhof kreis individue kaj sinteze ion, kio kutime estus parto de nacia folkloro; kaj per unu el tiuj spegulecaj renversigoj, kiuj estas iom karakterizaj por la miriga historio de esperanto, tiu aŭtore kreita proverbaro grandparte iĝis parto de la esperantistara folkloro! Oni multe citas ilin, multe uzas ilin en konversacioj, foje imitas ilin aŭ ŝerce misuzas ilin.

Tute alispeca verko, kiun oni almenaŭ rigardu, estas *Sciencaj studoj*, redaktita de Paul Neergaard. Leganto, kiu interesiĝas pri la scienca kaj teknika temo, iam trovos en la librolisto librojn pri sia faka intereso, sed *Sciencaj studoj* estas kolekto de artikoloj pri multaj diversaj sciencaj temoj

— originalaj esploroj je iom alta nivelo — kaj interese montras, kiel por tre diversaj sciencaj laboroj fakuloj povas uzi esperanton. Inter la eseoj troviĝas dek kvin humanismaj temoj: lingvistiko, literaturo, interlingvistiko, bibliografio, psikologio, arkeologio, juro, muziko ktp; kaj dudek unu pri matematikaj kaj

natursciencaj temoj: matematiko, astronomio, geologio, kolorsistemoj, hemio, botaniko, biologio ktp. Kredeble, neniu leganto povus vere kompreni ĉiujn el tiuj eseoj, sed la kolekto prezentas tre atestitan kaj interesan bildon pri la lingvaj rimedoj, kiujn esperanto proponas por tiuj fakaj celoj.

## KIE KOMENCU KOMENCANTO?

Iu, kiu jam lernis esperanton sufiĉe por legi esperantajn librojn ne nur pedagogiajn, aŭ iu, kiu ĵus konvinkiĝis, ke valoras la ne tre pezan penon por lerni esperanton, espereble trovis en tiu ĉi libreto ian elementan diagramon, pri kio ekzistas leginda, kaj trovos en propra kapo ideon, kion li aŭ ŝi persone deziras esplori, laŭ sia temperamento kaj gustoj.

Sed eble nia hipoteza nesperta scivolulo volus demandi: "Kie, en tereno pli vasta ol mi atendis, mi komencu mian esplorvojaĝon?"


Do: oni ĉiam devas komenci vojaĝon de la loko, kie oni estas; tio estas la granda malfacilaĵo de la vivo!

Unue: la komencanto komencu per io, kio eble iom sanige streĉos, sed ne tute venkos, lian nunan linvokapablon. Neniam forĵetu libron indigne, ĉar la stilo estas tro komplika, la vortaro tro granda, sed respektive flankenmetu ĝin. Tre eble ĝi estas verko valora, kiun vi ankoraŭ ne estas preta legi.

Due: la komencanto komencu per io, kio interesas lin aŭ ŝin. Por mi la poezio estis unu el la plej gravaj aferoj, post la bazaj bezonoj, en la vivo, sed tio ne devigas, ke por ĉiuj aliaj ĝi estu tia. Se vi estas sciencema kaj neniam legas nacilingvajn poemojn, komencu per, ekzemple, *La vivo de la plantoj*. Sed se via pasio estas la sveda literaturo, turnu vin unue al *Sveda antologio*. Se vi dediĉas multajn liberajn horojn al muziko, esploru inter la multaj esperantaj kantaroj kaj provu esperanton por kantado; kaj tiel plu. Eble iam vi trovos, kiel jam trovis multaj homoj, ke, ĉar la lingvo estas relative facila, vi povas ŝati multajn kulturajn aferojn pere de esperanto, kiujn vi antaŭe iel ne apetitis. Sed unue sekvu la propran nazon al tiu kaserolo,

kies odoro plej allogas vin.

Trie: ekzistas fuŝverkoj en esperanto, same kiel en aliaj lingvoj. De fuŝverko vi povus ricevi, kiel mi mem iam ricevis, tre negativan kaj maljuste negativan impreson pri esperanto kaj vi ankaŭ povus omite lerni



erarojn, kiujn vi poste devos pene mallerni. Estas do konsilinde komenci per verkoj, kiuj estas lingve kaj stile tre bonaj. Se vi dubas, vi povas konsulti iun spertan esperantiston — tamen ne forgesante, ke proverbiĝis la biblia averto, ke se blindulo kondukas blindulon, ili ambaŭ falos! Ne ĉiu, kiu laŭte bruas pri esperanto, estas vera spertulo pri ĝi. Kiel ofte en la vivo ĝenerale, la grandbuŝulo povas esti la grandfuŝulo kaj manopleneto de senkulturaj ekscentraj esperantistoj tielnomitaj ofte senkreditiĝis esperanton kaj malhelpadis la racian plimulton. Laŭ tiaj homoj nepre ne juĝu. Certe estos atingebla ia saĝa konsilonto.

Jen du libroj tre bonaj por explorema postkomencanto: *El-lernu!* de Ferenc Szilágyi kaj *Paŝoj al plena posedo* de William Auld. Tiuj ĉi libroj donas diversajn valorajn informojn pri gra-

matiko kaj aliaj aferoj, multajn bone elpensitajn ekzercojn, sed ankaŭ tre bone elektitajn specimenojn el la esperanta literaturo: specimenojn, kiuj ne estas stile tiel malfacilaj, ke ili konfuzus la nespertan leganton, sed kiuj ankaŭ ne estas stile aŭ enhance porinfanaj; ili estas veraj specimenoj de literaturo. Se serioza studanto estas ankoraŭ ĉe la stadio, kie li aŭ ŝi preferas teni la manon de gvidanto, Szilágyi aŭ Auld montros sin gvidanto helpema, inteligenta, ĉarma kaj neniam teda.

Multaj komencis plezurane studadon pri la esperanta literaturo per strange virtuoza libreto de Julio Baghy, *La verda koro*. Li verkis romaneton, simplan sed kortuŝan kaj interesan, pri militkaptitoj kaj aliaj en Siberio dum la unua mondmilito kaj pri esperanto en iliaj vivoj. Sed li komencis per minimuma vortaro kaj plej simplaj frazoj, kaj nur paŝo post paŝo progresigas la leganton al komprenado de pli komplikaj frazoj. Baghy verkis ĝin ĝuste por komencantoj. Estante ne nura pedagogo, sed vera verkisto, li samtempe kreis simplan artverkon aŭtentikan. Jen do bona deirpunkto.

Al tiu, kiu volas posedi kelkajn bonajn librojn, sed havas malmultan monon aŭ libropacon, mi konsilus, ke — post vortaro, gramatiko kaj elementaj legolibroj laŭdezire — li komencu per: *Esperanta antologio*, 33 rakontoj; se ĝi ekzistas, antologio de tradukoj bonaj el la nacia lingvo, ekzemple *Sveda poemaro*, *Sveda antologio*, *Sveda novelaro*; kelkaj originalaj verkoj kaj tradukoj de Zamenhof kaj poste, laŭ personaj elektoj, sed nepre ne ellasante Baghy kaj Kalocsay, Privat, Auld kaj — eble iom pli malfrue — Waringhien. Sed jen preskribo persona; la literaturo de esperanto estas tiel riĉa kaj enhavas tiom da altnivelaj verkoj, ke aliaj povus preskribi alimaniere.

Ĉiokaze, esperanto malfermas novan fenestron sur la mondo, ne nur por tiu, kiu povas vojaĝi, sed por tiu, kiu pro manko de mono, forto aŭ pasporto povas nur sidadi kaj silente legi. Eblas spiritaj aventuroj, eĉ dum oni estas sola sur la seĝo.

FINO

# TABULO

Grandan ekspozicion de abocolibroj en diversaj lingvoj aranĝos en majo 1982 Internacia Kultura Servo, YU-41001 Zagreb, p.p. 449, Jugoslavio. Se vi sendos ion por tiu ekspozicio, via nomo aperos en la katalogo.

Japana Esperanto-Instituto peras internacian korespondadon. Tiu, kiu deziras korespondi kun japanaj gesamideanoj, skribu al la suba adreso preslittere kun detala klarigo pri nomo, sekso, aĝo, profesio, hobiaj, kaj, se eble, kun portreto, Japana Esperanto-Instituto, Waseda-mati 12-3, Sinzyuku-ku, Tokio 162, Japanio.

Följ fredsdebatten, prenumerera på PACO! Utkommer med sex ordinarie nummer per år plus varierande antal specialnummer. Endast 25 kr per år.


Betala till Svenska sektionen av Mondpaca Esperantista Movado, postgiro 88 27 40-4.

Natalija Aroloviĉ estas 28-jara muzikistino, kiu interesiĝas ankaŭ pri pentroarto kaj libroj. Ŝia adreso estas SU-121019 Moskva G-19, Poste restante.

Ĉu vi volas helpi al pola aktorino ekzerci esperanton. Se jes, skribu al Alicja Rojek, str. Marszałkowska 111 w 1413, PL-00102 Warszawa, Pollando.

Tradukistoj kaj tradukantoj! Mi deziras fondi tutmondan asocion de esperantistaj tradukistoj. Bonvolu skribi al Zbigniew Czupkallo, PL-24-220 Niedzwica Duża, Pollando.

Knabinoj, jen korespondanto por vi! Li estas 28-jara hungaro, kiu interesiĝas pri psikologio, sociologio, politiko kaj filozofio. Károly Kiszely, Ady E. u. 2, H-2011 Budakalász, Hungario. Li ankaŭ lernas la svedan lingvon.



Kiun allogus korespondanto el la fama Plzeň en Ĉeĥoslovakio? Se vin, tiam vi notu lajan adreson: Jiří Proškovec, J. Krautwurm 10, CS-30158 Plzeň, Ĉeĥoslovakio. Li preferas junajn korespondantojn, verŝajne ĉar mem juna.

Nästa nummer av *La Espero* kommer att innehålla flera artiklar på svenska om esperanto i skolan. Numret ansluter till ämnet för årets årskongress i Nyköping. Det är önskvärt att så många lärare som möjligt får detta nummer i sin hand. Esperantoförbundet kommer att sprida detta nummer till vissa centrala institutioner och till orter där esperantoklubbar saknas, men klubbar och enskilda får också hjälpa till.

Din klubb eller du själv kan beställa ett antal exemplar. Ni får 10 ex för 30 kronor. Det räcker med ett meddelande till Esperantoförbundet om önskat antal, helst senast 31 mars. Tidningen utkommer kring mitten av april.

## Ekonomisk konferens

Nån gång i april (18 eller 25) kommer SEF att anordna en ekonomisk konferens, där SEFs totala ekonomi kommer att diskuteras, kostnader för informationsinsatser, medlemsavgifter o dyl. Inbjudan utgår till klubbarna med närmare detaljer.

## Extra! Extra! Ordböcker finns!

Saknar du en svensk-esperantisk ordbok? Om du är snabb kan du bli ägare till en. Inte den nya som alla väntar på, utan den tidigare som varit slutsåld i flera år. Man har nu plötsligt fått ett antal helt nya inbundna ordböcker på lager. De säljs tillsammans med Supplementet för 100 kronor sammanlagt. Slå till med detsamma! Antalet är mycket begränsat. Skicka 100 kr till postgiro 578-5, Esperantoförlaget.

Förlaget ber oss meddela också vilka rabattsatser som gäller vid inköp för över 300 kronor: 10% på egna utgåvor, 5% på andra förlags utgåvor. Samma rabatt kan tillgodoräknas vid inköp av 10 ex av samma titel.

## 18 april examensdag

Esperantoinstitutet meddelar, att 18 april blir examensdag i år. Anmälan ska vara inne senast den 1 april.

Anmälan till högre examen eller förfrågningar om det kan ni göra till Ebbe Vilborg, Prästgårdssängen 2, 412 71 Göteborg, tel. 031-40 52 74. Motsvarande för lägre examen gör ni hos Oskar Svantesson, Skonertgatan 1, 421 74 V. Frölunda, tel. 031-29 03 81.

Och så en vädjan från Institutet: glöm inte att sända in studierapporten för år 1981. Den sänds till Märtha Andréasson, 2265 Tolsered, 425 90 Hisings Kärra.

## Bidrag till SEF

Även mot slutet av året strömmar det in frivilliga bidrag till Esperantoförbundet. En av strömmarna heter **Klubo Cent**, genom vilken bidragsgivarna stöder Esperantoförbundet med en extra hundralapp. Sen sist har följande blivit "medlemmar" för 1981:

Märtha Andréasson, H. Kärra  
K R Elofsson, Örebro  
Sven Utberg, Lysekil  
Ivar Andersson, Hälleforsnäs  
Ragnar Hjorth, Stockholm  
Ivar Paulsson, Solna  
Valfrid Sandén, Bromma  
Britta Lindeberg, Malmö  
Ulf Ribers, Motala

Flera av de nämnda "medlemmarna" har betalt redan för 1982.

Andra bidrag kommer spontant: ibland i samband med någons högtid, ofta utan någon särskild anledning. Dessa gåvor kan vara en tia eller flera tusenlappar. Alla är lika välkomna!

Bland gåvor inkomna under 1981 vill vi gärna nämna:

till E Carléns 75-årsdag  
Einar Hermansson  
Ebba Persson, arv  
Lunds Esperantoförening

och Sydsvenska distriktet  
G. Mattsson, lotteri  
Ljungby Esperantoklubb  
K. Gustafsson  
Agda Olsson  
Henry Almar  
W. och D. Malmsten  
Kumla: till minne av  
Astrid Hammarberg

Många av bidragsgivarna vill förbli anonyma och återfinns inte här.

För alla typer av bidrag används samma postgirokonto: 20 12-3, Esperantoförbundet. Om det är fråga om **Klubo Cent**, antecknas detta särskilt på postgirotalongen.

Till alla bidragsgivare ett hjärtligt tack!

## Gör så här med böcker!

En särskild vädjan till de av våra medlemmar som sällan läser esperanto eller köper en esperantobok:

Det är viktigt att vi alla understödjer vår litteratur, vår kultur. Du kan göra en insats även om du inte läser.

Du kanske tycker att du inte har plats i bokhyllan. Vänta lite! Tag bort tre eller fyra böcker, lägg dem på vinden eller i källaren. Så köper du *Elektitaj fabloj de Krilov*, eller, varför inte?, *Aniario* samt *Frithiofs saga*.

Det här var tre mastiga böcker, men du behöver inte läsa dem. Nu har du plats i bokhyllan; ordna så du får ledigt på väl synligt ställe. Men vänta lite! Sätt inte in dem på plats innan du ringt till ditt närmaste bibliotek. Du hör efter om de har något av esperantolitteratur. Du kanske får svaret att det är ingen som frågar efter sådana böcker. Det låtsas du inte höra, utan hör efter försiktigt när bibliotekarien kan ha tid. "Jag har några intressanta böcker som det vore roligt att visa."


Ja, nu antar vi att ni har träffats. Du kanske får höra: "Jag vill inget bestämma nu, men vi skall ha sammanträde, Får jag behålla

böckerna till dess?" Du kan anse dessa böcker som sålda.

Du går hem och tänker över vilka böcker du skall fylla tomrummet med. Samma boktitlar? Nej, nån omväxling ska du väl ha!

Jag föreslår *Ĉiu ĉiun* av Teo Jung, en bok med tjockt och bra papper, 400 sidor. Sen en ganska ny bok, av Gaston Waringhien, *1887 kaj la sekvo*, 300 sidor. Och till slut *Poezia bukedo por geknaboj de la mondo*, av Bertram Potts, en rolig bok med trevliga bilder och lättfattlig poesi. Ställ denna sista emellan de andra, så står de stadigt. Ett litet esperantobibliotek med 800 sidor! Hoppas nu att de syns bra! När dina bekanta kommer, undrar dom: "Vad har du där?" Och du svarar: "Det är det allra nyaste inom esperantolitteraturen!"

Bengt Alsen



## Resumo en esperanto

En 1980 la Centra Statistika Oficejo realigis esploron pri la sveda loĝantaro. Tiun esploron anticipis kompleksa informado, ankaŭ en lingvoj de enmigrintoj. Pri la rezulto de tiu informado oni ankaŭ faris esploron, kiun gvidis Åke Rohdin. Sekve de tio la raporto prezentita enhavas ankaŭ resumon en esperanto. Ĝi komenciĝas jene:

"Ĉi tio estas eksperimento. Se vi tute ne komprenas la sekvontan tekston, vi estas en la sama situacio kiel multaj enmigrintoj, kiuj ricevas informojn en la sveda lingvo aŭ en alia lingvo,

kiu ankaŭ ne estas ilia gepatra lingvo. Io por pripensi!"

El la sama Oficejo atingis *La Esperon* la personargazeto *Kulramen*. En ĝi la sama Åke Rohdin per prezento de ilustraĵoj el la

esperanta revuo *Monato* montaras, kiel oni povas artisme prezenti tedajn statistikaĵojn. Li komprenebla kaptas la okazon serĉi kontakton kun esperanto-interesitoj.

# PERSONE

Mia edzo estis ofice forvojaĝinta, Lundgren, kiu volonte anstataŭas lin, malsanis, ĉiuj aliaj iel elturnis sin; nur 'eta mi' povis trovi liberan posttagmezon, dum kiu mi akompanu vizitantan francan inĝenieron, kiu anticipe anoncis sian mallongan restadon en nia urbo kaj esprimis la deziron, ke iu gvidu lin tra ĝi dum posttagmezo.

Mia edzo eĉ rezignis pri sia aŭto dum tiu tago, favore al mi, io kio vere ne oftas.

Mi iom ŝvitis je la penso, ke mi devos sola funkcii kiel gvidanto. Mi ja scipovas esperanton, sed ne tre fluas mia parolo. La kutimajn frazojn dumkunvenajn kaj dumkongresajn mi parkeras, mi eĉ kapablas skribi relative flue (ofte konsultante vortaron, tamen), sed plurhora babilado iom timigis min. Kaj prave.

La franco montrigis esti kvardekjara, bonaspekta kaj tre afabla — sed ankaŭ interesita pri plej diversaj aferoj. Post ne tre longa tempo mi sentis min kiel la viro en la kanto:

*Mi estas sola sur mia selo,  
mi estas sola sur mia selo,  
mi estas sola sur mia selo  
kaj mankas al mi ĉeval'.*

La "ĉevalo", kiu mankis al mi, estis vortaro. Sed mi ne estas certa, ke mi havus grandan utilon de ĝi.

La rondveturo tra la urbo komenciĝis sufiĉe bone. Unue ni vizitis la malnovajn kvartalojn, kaj la franco ĉefe komentariis tion, kion li vidis, dum mi plimalpli nur kapjesis. Ni de ioma distanco rigardis la kastelruinon kaj mi eĉ sukcesis rakonti ion pri ĝi. Poste la vojo kondukis nin preter la domo de la guberniestro. Kaj tie komenciĝis la problemoj.

Kiam mi nun skribas, mi konas la vorton 'guberniestro'. Sed ĝi komplete forestis el mia kapo, kiam la franco subite demandis:

— Ho, kia bela domo! Kio estas en ĝi?

— Estas ..., mi komencis, sed poste la lango tute ŝlosiĝis. Kio estas guberniestro? Estas la domo de iu ĉefo por la regiono, mi respondis. La vorton regiono mi memoris kaj mi esperis, ke ĝi taŭgas.

Tio ŝajne nenion diris al la franco. — Kia ĉefo? Ĉu industriisto?

— Ne, ne! mi tuj korektis lin. Li estas ŝtata funkciulo. Ie en la malantaŭo de mia cerbo mi rememoris, ke antaŭ ioma tempo *La Espero* ion skribis pri tiu temo, kaj mi estis kolera al mi, ke mi ne zorgis legis tion tiam. Fakte mi tute trasaltis tion, ĉar neinterea.

— Aha! la franco ekkriis. Li evidente komprenis min kaj komencis starigi tutan vicon da demandoj.

— Ĉu li estas elektita? Ĉu li estas nomita de la registaro? (jes, mi murmuris) Kio estas liaj taskoj? Ĉu li kontrolas la decidojn de la komunumoj? Ĉu li povas nuligi ilin? Kaj pli kaj pli, laŭ la sama enhavo.

Al multaj demandoj mi povis respondi jes aŭ ne, sed kiam li petis pri detaloj, mi mutiĝis. Klarigu en la sveda, kio estas la taskoj de guberniestro kaj kiel liaj dungitoj laboras! Mi fakte ne scias. Sed ĉu mi diru al fremdulo tion? Por ke li ricevu la impreson, ke mi estas stulta virino, kiu interesiĝis nur pri kudrado kaj kuirado? Absolute ne!

En tiu momento mi subite eltrovis, kiel saviĝi el la embarasa situacio. La manko de ĉevalo!

— Mi tre bedaŭras, ke mi ne kunportis mian vortaron, en kiu troviĝas ĉiuj tiuj specialaj vortoj, kiujn mi ne sukcesas memori ĝuste nun. Ho, kiel bedaŭrinda! Kaj kion alian la franco faru ol kredi min?

Ĉaŭ! kiel kutime.

Eta mi

## Esperantonytt fortsätter

Inför hotet att *Esperantonytt* helt skulle läggas ner har Tyresö Esperantoförening erbjudit sig att ta över administrationen av det lilla informationsbladet och kommit överens med Esperantoförbundet om det.

*Esperantonytt* riktar sig till sådana människor som en klubb eller en enskild aktiv esperantist kan vilja hålla ständigt informerade om esperanto. Det kan vara kulturnämnd, fritidsnämnd, skolkontor och huvudlärare i språk, bibliotek, lokala politiker, journalister, lokalföreningar som klubben har kontakt med, olika väntrum mm.

Liksom förut kommer *Esperantonytt* ut fyra gånger per år och skickas direkt till alla adressater. Innehållet i *Esperantonytt* publiceras löpande även i *La Espero*, så att alla medlemmar kan läsa det. Nr 4 för 1981, som inte kommit ut än, skickas ut enligt den gamla rutinen.

Annorlunda mot förut är att *Esperantonytt* bara kommer att sändas till adresser som man fått betalt för. Tidigare har Esperantoförbundet centralt finansierat en hel rad adresser till tidningar och riksdagsmän, men nu måste Tyresö Esperantoförening be klubbarna prenumerera för dem.

Styrelsen i Tyresö Esperantoförening håller på att gå igenom hela adressregistret och kommer att kontakta klubbarna om de viktigaste av de tidigare gratisadresserna.

Prenumerationspriset för *Esperantonytt* är 8 kr per år. Detta pris gäller för enskilda, bibliotek m fl som prenumererar direkt.

Klubbar och medlemmar som prenumererar för sina kontakter betalar ett rabatterat pris på 5 kr per adress. Det motsvarar porto, papper, tryck och omkostnader.

Man prenumererar genom att betala till postgiro 20 65 88-6, *Esperantonytt*. Det är samma konto som förut, och liksom

förut kommer Bertil Åkerberg att sköta adresseringen och distributionen.

Som korrespondensadress gäller annars Tyresö Esperantoförening, Ulla Luin, Myggdalsvägen 123, 135 42 Tyresö, tel. 08-712 82 91.

## På besök hos Unesco

Representanter för Internationella Esperantoförbundet har vid ett av sina återkommande besök vid Unesco i Paris fått träffa D. Najman, ansvarig för Unescos kontakter med omvärlden. Han var med på delegationens förslag att Unesco anordnar en konferens, där olika experter skulle ta upp den språkliga dimensionen i kommunikationen. Konferensen kommer att äga rum kring årskiftet 82/83.

## 1982-års kongress i Antwerpen

Den 67:e Internationella esperantokongress äger rum sista veckan i juli i Antwerpen, Belgien. Programmet kommer att bjuda på de traditionella bitarna: diskussioner, föredrag, teater och musik, utflykter, bal osv.

Ungdomarna har valt universitetsstaden Leuven till sin kongressort.

## Esperantos vänner bildade i Kina

Den 6 december 81 bildades i Peking organisationen "Esperantos vänner", som består av utvalda medlemmar ur Kinas riksdag, politiska organisationer, departementsansvariga och kända personligheter verksamma inom kulturen, utbildningen, vetenskapen, förlag och tidningar. "Esperantos vänner" räknar nu 98 medlemmar.

## Kort&gott

AUSTRALIEN. Australiens Esperantoförbund har haft kongress den 2—9 januari 1982.

MALTA. Esperantoförbundet på ön har i december 1981 firat 20 år av sin verksamhet.

JUGOSLAVIEN. *Moderna kroatia prozo*, en antologi med verk av kroatiska författare (604 sidor) presenterades för publiken i mitten av december. Vård vid presentationen var Kroatens författarförbund.

INDIEN. Indiens Esperantoförbund håller sin kongress i år i Vijayawada.

PAKISTAN. Pakistans Esperantoförbund har kraftigt utvidgat sin informationsverksamhet. Antalet artiklar om esperanto i landets tidningar, kurser och nya medlemmar har stigit markant.

JAPAN. Esperantotidskriften *Sekso kaj egaleco* (Sex och jämställdhet) kommer ut även i en japansk utgåva. Nyligen har tidskriften utfört en enkät om kvinnoliv i olika länder på uppdrag av den stora tidningen *Mainichi Shimbun*.

SPANIEN. Under VM i fotboll kommer Esperanto-Centret i Barcelona att inrätta ett informationskontor vid spelen.

ITALIEN. Milano-mässan har med anledning av sitt 60-års jubileum tryckt två affischer på esperanto.

UNGERN. Den 10 — 28 mars kommer Budapest att ha esperantoteater varje kväll. Då hålls nämligen i staden en träff av olika teatergrupper.

NICARAGUA. I slutet av 1981 har Nicaraguas Esperantoförbund bildats.